# KODEJO 2018

## Raporto pri la Kompleta Demandaro por Esperantaj Junularaj Organizoj

Komisiono pri Landa kaj Faka Agado


**Pretigis kaj redaktis**
Soraya Alvarez

**Reviziis**
Miguel Bento
Hans Becklin

# Enhavtabelo


**Enkonduko** **3**

**Partoprenintoj** **4**

Landaj organizoj 4

Fakaj organizoj 5

Membreco en TEJO 5

Jura personeco 6

Membraro en organizoj 7

Evoluo de aktiveco 8

Kunlaborado 9

Kunlaborado kun aliaj landaj/fakaj sekcioj 9

Estraro 9

**Merkatiko** **10**

Aktivado 10

Varbado 11

**Financoj** **13**

Membrokotizoj 13

Monfontoj 14

Subvencioj 15

Bilanco 15

**Konkludoj** **16**

# Enkonduko

La Kompleta Demandaro por Esperantaj Junularaj Organizoj (KODEJO) estis lanĉita en 2018 kaj estis fermita alplenigo en 2019.

Ĉi tiu demandaro estis kreita por koni pli detale la aktualan staton de landaj kaj fakaj sekcioj de TEJO, scii pli pri iliaj situacioj rilate al funkciado, merkatiko, komunikado kaj financoj kaj analizi tiujn informojn por pli efika agado kaj kunlaborado.

Respondis la demandaron 22 landaj sekcioj kaj 3 fakaj sekcioj. La plejparto de la landoj kiuj partoprenis estis de Eŭropo (12), sekvis Ameriko (5), Azio (4) kaj Afriko (1). Estas grave klarigi, ke ne ĉiuj organizoj kiuj partoprenis plenigis ĉiujn formularojn.


# Partoprenintoj

## Landaj organizoj

Entute 22 landaj junularaj organizoj partoprenis kaj plenigis la enketilon:

- **Argentino** | Juna Esperantistaro Argentina (JEA)
- **Brazilo** | Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO)
- **Britio** | Junularo Esperantista Brita (JEB)
- **Burundo** | Junulara Esperantista Burunda Organizo (JEBUO)
- **Ĉeĥio** | Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ)
- **Danio** | Dana Esperantista Junulara Organizo (DEJO)
- **Filipinoj** | Filipina Esperanto-Junularo (FEJ)
- **Francio** | Junulara Esperantista Franca Organizo (JEFO)
- **Germanio** | Germana Esperanto-Junularo (GEJ)
- **Hungario** | Hungara Esperanto-Junularo (HEJ)
- **Italio** | Itala Esperantista Junularo (IEJ)
- **Japanio** | Japana Esperanto-Junularo (JEJ)
- **Katalunio** | Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ)
- **Koreio** | Korea Esperanto-Junularo (KEJ)
- **Kubo** | Kuba Esperantista Junulara Organizo (KEJO)
- **Meksiko** | Meksika Esperanto-Junularo (MEJ)
- **Nederlando** | Nederlanda Esperanto-Junularo (NEJ)
- **Pollando** | Pola Esperanto-Junularo (PEJ)
- **Rusio** | Rusia Esperantista Junulara Movado (REJM)
- **Slovakio** | Slovakia Esperanta Junularo (SKEJ)
- **Usono** | Usona Esperantista Junularo (USEJ)
- **Vjetnamio** | Vjetnama Esperantista Junulara Organizo (VEJO)

La partopreno laŭ kontinento estas, de la plej granda ĝis la malplej granda nombro da respondintaj organizoj, Eŭropo (12), Ameriko (5), Azio (4) kaj Afriko (1). Oceanio ne partoprenis.





## Fakaj organizoj

- Biciklista Esperantista Movado Internacia (BEMI)
- Esperanto kaj Libera Scio (ELiSo)
- Esperanto-Universala Rok-Organizo, Kolektiva Komunik-Asocio (EUROKKA)

## Membreco en TEJO


Inter la 25 partoprenintaj organizoj, 24 estas sekcioj de TEJO kaj 2 deklaris, ke ili ne estas:




Rilate al la organizoj kiuj deklaris ne esti sekcioj de TEJO: landa organizo el Rusio (REJM) respondis, ke ĝi ŝatus iĝi landa sekcio, sed endas mencii ke ĝi ja jam estas landa sekcio de TEJO. La organizo “Esperanto kaj Libera Scio” respondis, ke ĝi ne certas, ĉu ĝi volas iĝi sekcio de TEJO aŭ ne.

## Jura personeco


La plejmulto estas el organizoj plene sendependaj: jure registritaj kiel sendependaj organizaĵoj (7). Due estas nejuraj: funkciado kvazaŭ jure registritaj organizaĵoj (6). Ankaŭ estas organizoj sendependaj kaj kun membreco en nejunularaj asocioj (2). Dependaj: jure agnoskataj en la statutoj de nejunularaj organizaĵoj, ne estas formalaj organizaĵoj laŭ la naciaj leĝoj (2). Laste, malformalaj organizaĵoj (2).




Landaj kaj fakaj sekcioj ofte ne membras en la nacia junulara konsilio de la koncerna lando. Nur du kiel plena membro kaj aliaj du kiel observanto aŭ alia speciala membro:




La plejmulto ne estas sekcio de alia organizo krom TEJO (18), neniu planas iĝi tia sekcio ene de unu jaro. Nur kelkaj (7) estas sekcio de alia organizo.




## Membraro en organizoj


Rilate al membroj en organizoj estas diversaj ciferoj, kaj tio ne estas facile klarigebla temo, sed oni povas simpligi tion dirante ke estas de 0 ĝis 200 membroj. La plejmulto de organizoj (15) informis ke ili ne havas pli ol 50 membrojn. Aliaj organizoj (5) deklaris havi inter 50 kaj 100 membrojn kaj malgranda kvanto da organizoj (3) havas 100 membrojn aŭ pli. Nur unu organizo (BEMI) klarigis ke ne eblas kalkuli la kvanton da membroj kaj HEJ ne respondis.

Sube aperas ĉiu organizo kiu respondis kaj la indikita membrokvanto:

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| **REJM 0** | **DEJO 9** | **JEA 10** | **SKEJ 10** | **MEJ inter 15 kaj 30** |
| **JEB 16** | **KEJ (Katalunio) 17** | **VEJO 20** | **KEJ (Koreio) 22** | **ĈEJ 30** |
| **JEFO 32** | **NEJ 32** | **KEJO 37** | **ELiSo 44** | **IEJ 45** |
| **USEJ Ĉ 50** | **EUROKKA 50** | **FEJ 54** | **BEJO 85** | **JEJ 77** |
| **GEJ Pli ol 100** | **PEJ 130** | **JEBUO Ĉ 200** | | |


## Evoluo de aktiveco

Kompare kun la aktiveco en 2017, la organizoj taksis sian aktivecon en 2018.
5 organizoj estis malpli aktivaj en 2018 ol en 2017: HEJ, MEJ, REJM, VEJO kaj ELiSo.
10 organizoj estis same aktivaj en 2017 kaj en 2018: NEJ, JEJ, BEMI, JEA, PEJ, SKEJ, IEJ, KEJ (Koreio), JEFO kaj EUROKKA.
Aliaj 10 organizoj estis pli aktivaj en 2018 ol en 2017: BEJO, GEJ, JEBUO, ĈEJ, DEJO, KEJO, FEJ, USEJ, JEB kaj KEJ (Katalunio).





La ĉefaj aktivuloj ofte troviĝas en diversaj urboj de la lando (68%). Nur en 32% de la organizoj la aktivuloj troviĝas ĉefe en nur unu urbo de la lando.

Rilate al renkontiĝoj: 52% de la organizoj ne havas regulan renkontiĝon ĉiujare (13) kaj 48% havas regulan renkontiĝon ĉiujare (12):



## Kunlaborado

Rilate ĝeneralan kunlaboron kun la nejunulara E-movado: plej multaj organizoj kunlaboras kun nejunuloj (20), sed aliaj ne faras tion (4) pro diversaj kialoj, kaj en unu lando ekzistas nur junulara movado.





## Kunlaborado kun aliaj landaj/fakaj sekcioj

La plejmulto kunlaboras, de la plej ofta maniero ĝis la malplej ofta maniero, per: persona kontakto kun aktivuloj en aliaj landoj, partopren(ig)o en iliaj renkontiĝoj kaj internaciaj projektoj. Kelkaj organizoj (proksimume 30% el ili) diris ke ili ne kunlaboras kun aliaj landaj aŭ fakaj sekcioj de TEJO.

## Estraro

La Estraro ŝanĝiĝas: ĉiujare (9), ĉiun duan jaron (6), neregule (6), laŭ alia periodo (4).



La voĉdonado por la Estraro okazas plejofte persone, sed ekzistas du manieroj: oni devas ĉeesti, sed neĉeestantoj povas transdoni sian voĉon aŭ anticipe sendi (11), aŭ oni devas ĉeesti, kaj nur rajtas voĉdoni kiuj estas surloke (8). Alia manero, malpli ofta, estas voĉdoni distance: rete aŭ poŝte (6)




## Merkatiko


Klarigo: JEFO kaj REJM ne plenigis ĉi tiun formularon.

### Aktivado


La respondeculoj de la organizoj taksis ke la plej gravaj aktivaĵoj, laŭ ordo de graveco, estas: organizado de renkontiĝoj, partopreno kaj ebligo de partopreno en aliaj E-renkontiĝoj, videbligo per sociaj retoj kaj reta trovebleco de la organizaĵo. La aktivaĵoj taksitaj kiel malplej gravaj estas: kunlaborado kun aliaj teritoribazitaj junularaj organizaĵoj kaj kunlaborado kun aliaj junularaj organizaĵoj.
La kampoj pri kiuj la organizoj efektive laboras, de la plej aktiva ĝis la malplej aktiva, estas: organizado de renkontiĝoj, partopreno kaj ebligo de partopreno en aliaj E-renkontiĝoj, videbligo per sociaj retoj kaj ĉeesta informado. La kampoj pri kiuj la organizoj malplej laboras estas: kunlaborado kun aliaj teritoribazitaj junularaj organizaĵoj kaj kunlaborado kun neesperantistaj organizaĵoj.

## Varbado

Ĉefaj kanaloj kaj platformoj por varbado, de la plej uzata ĝis la malplej uzata, estas: Facebook, organiza komunikilo inter membroj (retpoŝtlisto, forumo), propraj retpaĝoj, babilejo (WhatsApp, Telegram, IRC...), Twitter kaj reta novaĵbulteno.





La lingvoj en kiuj oni komunikas la novaĵojn ofte estas Esperanto kaj la nacia lingvo (19), due kelkaj organizaĵoj faras tion nur Esperante (4). Neniu nur nacilingve.





La plej ofta kialo por uzi ambaŭ lingvojn estas la komprenado de novuloj/komencantoj.

Rilate al komunikado uzante retpoŝtliston por membroj aŭ estraranoj, la plej multaj uzas la saman por ambaŭ: estraranoj kaj membroj (10). Apartaj listoj por estraranoj kaj membroj (5). Ni ne havas (3). Jes, por membroj (1).




La plej uzataj varbiloj kaj teknikoj estas: prelegoj, afiŝoj, flugfolioj kaj varbado de retpoŝtadresoj.




Varbiloj, kiujn oni ŝatus uzi sed ne havas (ĉu pro manko de rimedoj, fakaj lertecoj, ktp) estas: atelieroj (praktika enkonduko al Esperanto), flugfolioj kaj afiŝoj.
Kelkaj organizoj havas varbmaterialojn kiujn ili mem produktas (12) kaj aliaj ne (11).

## Malfacilaĵoj por varbi esperantistojn


La plej oftaj malfacilaĵoj por varbi esperantistojn estas: ĝenerala nescio, manko de intereso, junuloj estas tre okupitaj pro studado kaj laboro. Kelkaj menciis malfacilecon por renkontiĝi kaj la mankon de mono.

# Financoj

Klarigo: REJM ne plenigis ĉi tiun formularon.


## Membrokotizoj

Ofte membroj de organizaĵoj pagas membrokotizojn (15). En kelkaj organizoj ne (9).




Membrokotizo ne ekzistas foje ĉar la statuto aŭ strukturo de la organizo ne permesas tion, foje ĉar pro la ekonomia situacio de la lando oni preferas, ke la aliĝo estu senpaga. Nur unu organizo dirs, ke ĝi jam havas sufiĉan monon kaj ne plu bezonas membrokotizojn (JEB).

Ofte la membrokotizo estas egala por ĉiuj (11) sed en kelkaj organizoj ne (6).





En organizoj kie membrokotizo ne estas egala por ĉiuj, la plej ofta kategorio temas pri aĝoj (pli maljunaj homoj pagas pli), kutime oni dividas tion laŭ junuloj kiuj aĝas pli ol 25 aŭ pli ol 30. Alia kategorio temas pri nelaboruloj aŭ laboruloj. Aliaj kategorioj kiuj aperas estas "subtenanto" aŭ "patrono", studento kaj handikapulo.

Rilate al kialoj por aliĝi ofte estas rabato kaj partopreno en eventoj/projektoj. Sed pluraj el ili simple nenion konkretan vere havas. Plejparte la aĝlimo estas 35 samkiel TEJO, sed ankaŭ abundas tiuj kun 30.


## Monfontoj

Monfontoj, de la plej ofta ĝis la malplej ofta, estas: membrokotizoj, donacoj, postkongresa profito, vendado (de T-ĉemizoj, algluaĵoj...) kaj subvencio de fondaĵoj.



## Subvencioj


Rilate al subvencioj plej ofte oni neniam petas subvenciojn (12), kelkaj ricevis subvencio(j)n en la pasintaj tri jaroj (7), aliaj ne kredas je subvencioj (2), kelkaj nuntempe ricevas subvencio(j)n (2) kaj laste sensukcese petis subvencio(j)n en la pasintaj tri jaroj (1):




Kelkaj organizoj el Eŭropo ricevas subvenciojn de Erasmus+. Aliaj organizoj ricevas subvenciojn de aliaj fondaĵoj, ekzemple Wikimedia Foundation kaj Esperantic Studies Foundation, aŭ subtenon de la registraro.

## Bilanco

Nuna bilanco de organizaĵoj: pli ol 2000 eŭroj (12), De 0 ĝis 2000 eŭroj (10), malpli ol -2000 eŭroj (2). Tiuj 2 organizoj estas Junulara Esperantista Burunda Organizo kaj Korea Esperanto-Junularo.



La plej signifaj elspezoj de la organizaĵoj en 2018 estis: vojaĝigo de aktivuloj, organizado de eventoj/renkontiĝoj kaj reklamado.

### Utileco de TEJO al financoj

En la formularo oni faris demandon pri tio, kiel TEJO povus esti utila al organizoj en la fako de financoj, kaj la plej ofta respondo estis, ke TEJO povus helpi financante projektojn, donante subvenciojn, informante pri internaciaj subvencipetoj aŭ helpante pri reklamoj.

## Konkludoj

### Kunlaborado

Kunlaborado havis pozitivajn rezultojn. Inter landaj kaj fakaj sekcioj ĝi plej ofte okazas per persona kontakto kun aktivuloj en aliaj landoj, pro tio indus instigi kaj motivi organizojn por kunkrei kaj partopreni internaciajn projektojn.

### Informiloj

Organizoj uzas malsamajn kanalojn kaj platformojn por varbado, kio estas grava afero nuntempe, kiam ekzistas multaj komunikiloj en interreto.
Rilate al uzado de retpoŝtlistoj, la plej multaj uzas la saman kaj por estraranoj kaj por membroj. Ĉi-kaze taŭgus havi apartan retpoŝtliston por estraranoj; tiel la interna komunikado estus pli efika.

### Monfontoj

La ĉefa monfonto por organizoj estas membrokotizoj kaj, due, donacoj. Subvencioj foje estas parto de la monfontoj sed ne estas vaste uzataj.

### Subvencioj

Subvencipetoj kutime efektiviĝas en organizoj el Eŭropo. Tiuj organizoj kutime petas ilin per Erasmus+.
Rimarkindas ke kelkaj organizoj ŝatus havi pli da informo pri internaciaj

subvencipetoj. Donante pli da informo pri ĉi tiu temo ni ebligus subvencipetadon al pliaj organizoj, pro tio indus pli da kunlaborado inter TEJO kaj landaj/fakaj sekcioj.

## Bilancoj

La plejmulto de la organizoj havis pozitivajn bilancojn. Nur du organizoj deklaris negativajn rezultojn.